

Speciala Kontribuo 1. “MILITO PER MIAJ OKULOJ”

el “TERanidO”, Busana Filio de Korea Esperanto-Asocio, n-ro 304, majo 2022

特別寄稿 私が見た戦争 韓国エスペラント協会釜山支部機関誌“TERanidO”から

Mia nomo estas Petro Palivoda. Mi estas 62-jara ukraina kaj esperanta poeto kaj tradukisto, mi loĝas kun mia edzino en vilaĝo situanta proksimume je 20 km de Kijivo (Kievo), ĉefurbo de Ukrainio.

Koreio ne estas fremda lando por mi. Lastatempe, Eldonejo Zindale en Seulo aperigis prozan libron de ukraina verkistino Ĥristina Kozlovska “Kato Floro” en tri lingvoj: korea, esperanta kaj angla. Mi esperantigis kaj angligis la verkojn en la libro, kaj tradukisto kaj redaktoro de la korea Esperanto-revuo TERanidO sinjoro Ombro-Jang koreigis ilin. Antaŭe la sama revuo publikigis en mia traduko prozajn kaj poeziajn verkojn de nuntempaj ukrainaj aŭtorinoj Ĥristina Kozlovska, Bohdana Jehorova kaj Maria Mikicej.

私の名前はピーター・パリヴォーダです。私は 62 歳のウクライナ人でエスペラント人の詩人であり翻訳者です。私は妻と一緒に、ウクライナの首都キーウから約 20km の村に住んでいます。

韓国は私にとって知らない国ではありません。最近、ソウルのジンデル出版社は、ウクライナの作家クリスティーナ・コズロフスカ「ネコ、フローロ」を韓国語、エスペラント語、英語の 3 か国語で出版しました。本の中で私が作品をエスペラント語と英語に翻訳し、韓国の翻訳者でエスペラント誌 TERanidO の編集者である Ombro-Jang 氏が校正しました。以前、私の翻訳で、同じ雑誌で、現代のウクライナの作家クリスティーナ・コズロフスカ、ポーダナ・エホロワ、マリア・ミキチェイの散文と詩の作品を掲載しました。

Jam dum pli ol kvardek tagoj mia Patrujo Ukrainio heroe rezistas al rusaj trupoj. Mi neniam forgesos la matenon de la 24-a de februaro, kiam proksimume je la 5-a horo mia edzino vekis min per la vortoj: "Leviĝu, milito estas". Ekstere estis aŭdeblaj eksplodoj. En la lastaj tagoj antaŭ la 24-a de februaro, ni vivis kun maltrankvilaj atendoj, la usona registaro avertis nian registaron, ke Rusio atakos nian landon, sed ni ne povis kredi, ke tio eblas en la 21-a jarcento. Ni tuj telefonis nian filinon, kiu loĝis kun sia edzo kaj du filinoj (5- kaj 8-jara) en Kijivo. Ili kaŝis sin en la kontraŭbomba rifuĝejo dum du tagoj, kiam ili aŭdis alarmajn sirenojn, kaj poste veturis per la aŭto al mia bona amiko loĝanta en la okcidento de nia lando, kie estis iomete pli sekure. Sed rusaj misiloj komencis alveni tien, kaj nia filino kun la nepinoj decidis rifuĝi en Francio, kie unu familio afable kaj bonkore akceptis ilin.

すでに 40 日以上の間、私の国ウクライナはロシア軍に英雄的に抵抗してきました。2月24日の朝、朝5時ごろに妻が「起きて、戦争がある」という言葉で私を起こしたのを決して忘れません。外で爆発が

ありました。2月24日以前の数日間、私たちは不安を抱いて生きていました。米国政府はロシアが私たちの国を攻撃するだろうと政府に警告しましたが、21世紀にそんなことが起こるとは信じられませんでした。私たちはすぐに、夫と2人の娘（5歳と8歳）と一緒にキーウに住んでいた娘に電話をしました。彼らは警報サイレンを聞いて2日間爆弾シェルターに隠れ、それから私たちの国の西に住んでいる私の親友のところへ車で行きました。そこでは少し安全でした。しかし、ロシアのミサイルがそこも攻撃を始め、私たちの娘と孫娘はフランスに避難することを決心しました。そこでは、ある家族が親切に受け入れてくれると言ってくれたからです。

Matene de la 24-a de februaro mi afiŝis ĉe Fejsbuko: “Ne paniku! Ni estas sur nia tero! Dio kaj la Armitaj Fortoj de Ukrainio estas kun ni!” Multaj homoj, precipe virinoj kun infanoj, rifuĝis en pli sekuraj lokoj, inkluzive en eksterlando. Mi kun mia edzino decidis resti en nia vilaĝo. Ni aranĝis lokon en la kelo, kie estas stokitaj legomoj kaj ladmanĝaĵoj, por kaŝiĝi tie en la kazo de pripafado aŭ bombado. En la vilaĝo estis tuj organizita teritoria defendo, kies membroj iĝis la viroj, kiuj iam servis en la armeo. La defendanoj ricevis pafarmilojn. La enirejo kaj elirejo de la vilaĝo estas kontrolataj per ili. Vojoj estis blokita kontraŭ la ebla trapaso de malamikaj tankoj. (La foto farita de fotisto Nina Hruŝevska)

2月24日の朝、私は Facebook に次のように投稿しました。「パニックにならないで！私たちは私たちの土地にいます！神とウクライナの軍隊が私たちと一緒にいます！」多くの人々、特に子供を持つ女性は、海外を含むより安全な場所に避難しました。妻と私は私たちの村に滞在することにしました。銃撃や爆撃の場合にそなえて、私たちは地下室に場所を作り、野菜と缶詰食品を貯蔵しました。村ではすぐに、軍隊経験者で構成された自警団が組織されました。団員には銃器が与えられました。入り口は彼らが警備しました。村は敵の戦車が通過する可能性があるために道路が封鎖されていました（写真家 Nina Khrushchev による写真）。

Nia vilaĝo situas sur la maldekstra bordo de la Dnipro Rivero. Fortune por la vilaĝanoj, sur nia bordo ne estis batalado aŭ raketatakoj kaj la vilaĝo ne estis okupita de la rusaj nazioj. La plej danĝeraj aferoj estis sur la mala flanko, kie la malamikoj provis traŝiriĝi al Kijivo. Sed la pordoj kaj fenestroj en niaj domoj skuiĝis pro eksplodoj de bomboj kaj artileria pripafado. Homoj dormis vestitaj aŭ en la keloj aŭ en relative sekuraj lokoj en siaj domoj. Sirenoj pri eventuala aeratako sonadis konstante: tage kaj nokte.

私たちの村はドニエプル川の左岸にあります。この村にとって幸いなことに、私たちの側では戦闘やロケット攻撃はなく、村はロシアのナチスによって占領されませんでした。最も危険だったのは反対側で、そこでは敵はキーウに突入しようとしていました。しかし、私たちの家のドアと窓は爆弾と砲撃によって揺れました。人々は地下室か家の比較的安全な場所で服を着て寝ました。空襲警報が昼も夜も絶えず鳴りました。

Nun la situacio proksime de la ĉefurbo iomete trankviliĝis, ĉar niaj trupoj subpremis la rusan ofensivon, kaj restaĵoj de la malamikaj trupoj moviĝis al la oriento kaj la sudo de nia lando. Ne nur militaj objektoj en Ukrainio estas bombardataj kaj pripafataj, sed

ankaŭ loĝejoj domoj, hospitaloj, akuŝejoj, lernejoj kaj infanĝardenoj. Multaj civiluloj estas mortigitaj, ankaŭ infanoj. Vera genocido estas realigata en la okupataj setlejoj.

私たちの軍隊がロシアの攻撃を抑制し、敵軍の残党が私たちの国の東と南に移動したため、首都の近くの状況は少し落ち着きました。ウクライナの軍事施設だけでなく、住宅、病院、産科病棟、学校、幼稚園も爆撃されています。子供を含む多くの民間人が殺されています。占領下の集落では、真の大量虐殺が行われています。

Niaj urboj kiel Mariupol, Irpin kaj Borodjanka estas nun konataj en la tuta mondo, tie rusaj faŝistoj montris sian bestan naturon. La tuta mondo estis ŝokita de la "Buĉa masakro". Buĉa estas urbo apud Kijivo, la rusaj monstroj detruis ĝin tute, kaj centoj da civiluloj estis torturitaj kaj poste mortpafitaj kun senprecedenca krueleco. Tiuj barbarojn kaj sovaĝulojn haltigas nenio. Homaj reguloj kaj normoj estas nekonataj al ili. Virinoj kaj infanoj estas seksperfortataj, kaj senarmaj civiluloj estas mortpafataj. Nur por amuzo. (*Foto:) Eĉ sovaĝaj bestoj ne faras tion, kiel tiuj tiel nomataj "liberigantoj". Ĉio estas elprenata el la domoj: televidiloj, komputiloj, lavmaŝinoj, fridujoj kaj aliaj hejmaj aparatoj, juvelaĵoj, vestaĵoj, eĉ tolaĵo kaj fekseĝoj por hejmenporti. Ĉio prirabita, eĉ budoj por hundoj, estas ankaŭ sendata al Rusio per poŝto el la teritorio de Belorusio, kie ankaŭ troviĝas rusaj trupoj.

マリウポリ、イルピン、ボロジヤンカなどの私たちの都市は現在世界中で有名になってしまいましたが、そこでは、ロシアのファシストが野獣のようです。全世界は「ブチャ虐殺」にショックを受けました。ブチャはキーウの近くの都市であり、ロシアのモンスターがそれを完全に破壊し、何百人もの民間人が拷問され、前例のない残酷さで射殺されました。これらの野蛮人を止めるものは何もありません。人間のルールと基準は彼らにはないのです。ただ楽しみのために、女性と子供がレイプされ、非武装の民間人が射殺されています。(*写真:)野生動物でさえそんなことはしません。テレビ、コンピューター、洗濯機、冷蔵庫、その他の家電製品、宝石、衣類、さらにはリネンや便座など、すべてが家から盗まれています。すべてが略奪されるのです、犬小屋までも。それはロシア軍が駐留しているベラルーシの領土から郵便でロシアに送られます。

Kiam mi skribis ĉi tiun artikolon, venis mesaĝo, ke rusoj plu batalas kontraŭ civiluloj. Ili trafis la fervojan stacion Kramatorsk per misilo Iskander. Pli ol 50 homoj estas mortigitaj kaj pli ol 100 homoj estas vunditaj. Ĉe la stacidomo en tiu tempo estis miloj da homoj, kiuj volus evakuiĝi, kaj rusaj faŝistoj sciis tion. La nivelo de krueleco de la armeo de teroristoj kaj ekzekutistoj de la Rusa Federacio ne konas limojn.

私がこの記事を書いたとき、ロシア人はまだ民間人を攻撃しているという情報が来ました。彼らはイスカンダル・ミサイルでクラマトルスク駅を襲いました。50人以上が死亡し、100人以上が負傷しました。当時の駅には何千人もの人々が避難したいと集まってきていました。そしてロシアのファシストはそれを知っていました。ロシアのテロリストと死刑執行人の軍隊の残酷さのレベルには限界がありません。

Ukrainio estas pacema lando. Ĝi neniam atakis iun ajn kaj ne estis atakonta. En Ukrainio la rajtoj de ĉiuj homoj estas respektataj. Sed Rusio volas havi novajn teritoriojn, do Putin diris, ke li volas liberigi Ukrainion de la nazioj. Por li nazioj estas tiuj, kiuj

parolas la ukrainan lingvon, respektas siajn heroojn kaj evoluigas sian ukrainan kulturon. Tio estas, por rusoj preskaŭ ĉiuj ukrainoj estas nazioj.

ウクライナは平和な国です。それは誰も攻撃したことはなく、攻撃しようともしていませんでした。ウクライナでは、すべての人々の権利が尊重されています。しかし、ロシアは新しい領土を望んでいるので、プーチンは、ウクライナをナチスから解放したいと言いました。彼にとって、ナチスとはウクライナ語を話し、自身の英雄を尊重し、ウクライナ文化を発展させる人々です。つまり、ロシア人にとっては、ほとんどすべてのウクライナ人はナチスということになるのです。

En 2014, Rusio invadis Ukrainion kaj okupis la Krimean duoninsulon kaj grandan parton de Donecka kaj Luhanska provincoj. Nun ili decidis tute likvidi la ukrainojn kiel popolon. La rusa gvidantaro ne kaŝas tiun fian celon. Ĉi tio estas genocido. Tiel agas nazioj. La rusoj timigas ukrainojn kaj la tutan mondan komunumon, minacante ilin per nukleaj armiloj. Ili planis konkeri nian landon dum kelkaj tagoj. Sed Ukrainio batalas. Ni unuiĝis kiel neniam antaŭe. Kaj ukrainlingvaj kaj ruslingvaj loĝantoj de Ukrainio batalas kontraŭ la okupantoj. Laŭ la lastaj enketoj, ĉirkaŭ 95 procentoj de la ukrainia loĝantaro kredas je nia venko. Preskaŭ la tuta mondo estas ĉe nia flanko. . Niaj bluflavaj flagoj estas videblaj tutmonde. Ĉie estas aŭdeblaj la vortoj: "Gloro al Ukrainio! - Gloro al herooj!" Multaj landoj adoptis sankciojn kontraŭ Rusio, akceptas niajn rifuĝintojn, helpas Ukrainion per financoj, manĝaĵoj kaj, plej grave, per armiloj. Mi certas, ke ni venkos, ĉar alie ni pereos, ĉar tiam Rusio ne haltos, ĝi atakos aliajn eŭropajn kaj aziajn landojn por realigi sian frenezan planon - restarigi la Rusan Imperion.

Ukrainio bezonas subtenon de la tuta mondo. Mi scias, ke via lando, Korea Respubliko, estas ĉe nia flanko, kaj ĝi multe helpas nin. Vi scias, kio estas milito, kiel vivi dum multaj jaroj en milito. Tial vi komprenas nin. Sinceran dankon al la granda korea popolo pro tio! **SUBTENU UKRAINION!**

La 10-an de aprilo 2022 Petro Palivoda, Ukrainio.

2014年、ロシアはウクライナに侵攻し、クリミア半島とドネツク州とルハンシク州の多くを占領しました。今、彼らはウクライナ人を民族として完全に抹殺することを決定しました。ロシアの指導部はその邪悪な目標を隠していません。これは大量虐殺です。それはナチスがしたことです。ロシア人は、核兵器でウクライナ人と全世界を威嚇します。彼らは数日間で私たちの国を征服することを計画しました。しかし、ウクライナは戦っています。私たちはかつてないほど団結しています。ウクライナ語を話すウクライナ人もロシア語を話すウクライナ人もともに占領者と戦っています。最新の世論調査によると、ウクライナの人口の約95パーセントが私たちの勝利を信じています。ほぼ全世界が私たちの味方です。私たちの青と黄の旗は世界中に見られます。「ウクライナに栄光あれ!」「英雄に栄光を!」という言葉はどこでも聞こえます。多くの国がロシアに対する制裁措置を採用し、難民を受け入れ、ウクライナに金銭、食糧、そして最も重要なこととして武器を支援しています。私たちは勝利します。もし負ければ、ウクライナは滅亡し、ロシアの気ちがいじみた計画、つまりロシア帝国復活を狙って、他のヨーロッパやアジアの国々を攻撃するでしょう。

ウクライナは全世界の支援を必要としています。あなたの国韓国が私たちの味方です。そのことは私たちが大いに助けてくれます。あなた方は私たちの立場を理解してくれるでしょう。素晴らしい韓国の人々に心から感謝します！ウクライナを支援してください！

2022年4月10日 Petro Palivoda

2022.5.5 Japanio 日本

青空

「オデーサの空まだ平和」とメールくる3月初旬開戦の頃
青空を突如切り裂き幼子が、「オデーサ戦線異常なし」の日
青空を見ることもなく死ぬのだろうか製鉄所の地下影揺らぎいる
あれ、ネコが、破壊された死の町の不似合いに青いウクライナの空
青空に飛び立つヒバリその間に小麦畑はキャタピラの下
「平和への希望だけは奪わせない」、ロシアの友に戻れ青空
我が庭の青空を見るその向こうはるか向こうにウクライナの空
空の青、小麦の黄色おのおのの胸に飾ろう心に刻もう

"La ĉielo de Odeso ankoraŭ estas paca",
komence de la milito en marto,
venis al mi retmesaĝo.

Io subite tratanĉas la bluan ĉielon
tio mortigis bebon.
en « Senanomalia fronto de Odesa »

Ĉu ili mortos sen vidi la bluan ielon?
Ombroj balancas
en la subtera kaŝejo de la ŝtalfabriko.

« Ho, kato »
sub la ukraina ĉielo bluega,
netaŭga por la detruita urbo de morto.

Alaŭdo ekflugas en la bluan ĉielon,
Ho, intertempe,
la tritika kampo estas sub tankaj raŭpoj.

« Mia revo por paco estas mia propraĵo »

diras rusa amiko,
revenu al li la blua ĉielo.

Mi vidas la bluan ĉielon en mia ĝardeno,
malproksime, multe malproksime,
estas la ukraina ĉielo.

Ni havu sur la brusto,
Ni tenu en la koro
la bluan de la ĉielo kaj la flavon de la tritikoj.

2022.5.6 Ĉeĥio ЧЕХО

Saluton sinjoro Jasuo,

En multaj landoj oni helpas en diversaj flankoj. Ekzemple, el Bruselo venis 3 tunoj de humanitara helpo. Moldavio sendis specialistojn por deaktivado de minioj kaj aliaj eksplod'materialoj. El Litovio venis konstru'materialoj por riparado de domoj. Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio riparas difektitan militteknikon. Hungario aldonas medicinan helpon. Grekio, Danlando kaj Rumanio promesis helpon pri riparado de urboj post la milito.

Eŭropa Unio malpermesis elsendon de tri rusaj kanaloj pro falsaj kaj malveraj informoj.

Kun subteno de "UNICEF" kaj "Ruĝa kruco" oni savis de Mariupol ĉirkaŭ 400 homojn.

Fuĝintoj de sudaj regionoj en urbo Ĉernovcy plantis proksimume 1000 rozojn en teritorio de universitato. Multaj de ili faras volontulan laboron, distribuas al loĝantaro manĝaĵojn, medikamentojn, kuiras, faras ŝirm'retojn, kudras specialan defend'vestaĵojn. Helpas al homoj trovi loĝlokojn, informojn, laboron, kaj tiel plu.

En ĉeĥaj urboj multaj fuĝintoj jam laboras, tiuj, kiuj ne povis labori, partoprenis printempan purigadon en parkoj kaj setlejoj. Mi donacis al fuĝintoj monon, manĝaĵojn, vestaĵojn, ban'aĵojn, ludilojn, infan'nutraĵojn, manĝilarojn, lit'tukojn, viŝ'tukojn kaj aliajn utilajn aĵojn. Ankaŭ aliaj ĉeĥaj esperantistoj helpas laŭ sia eblo. Estas tre grave resti homecaj en malfacilaj tempoj.

Oni jam identigis kelkajn personojn, kiuj kulpas pri murdoj kaj turmentadoj de civitanoj el Kijeva regiono. Murdistoj venis el Pskov, do ili estis rusoj, estas konataj ankaŭ iliaj personaj nomoj.

En Hersono okupantoj likvidas librojn de librejoj, lernejoj, librovendejoj (barbaroj librojn ne bezonas). Kaj aliaj ĉagrenaj informoj: okupantoj kaptis kaj turmentis pastron de ukraina ortodoksa eklezio ĝis lia morto. Li estis paca homo, ne tiom forta, ne tiom

juna. Li mortis sen iu kulpo. Kaj la alia afero: okupantoj forveturigas ukrainajn infanojn de okupitaj teritorioj, sen iu leĝo, sen iu rajto (simple ili ŝtelas). Tio estas genocido!

Olga

多くの国から、さまざまな方法で支援が提供されています。たとえば、ブリュッセルからは3トンの人道援助が来ました。モルドバは、地雷やその他の爆発物処理の専門家を派遣しました。家を修理するための建築材料はリトアニアから来ました。ポーランド、スロバキア、チェコ共和国は、損傷した武器を修理しています。ハンガリーは医療援助を追加します。ギリシャ、デンマーク、ルーマニアは、戦後の都市の修復を支援することを約束しました。

欧州連合は、虚偽の情報を拡散していると、ロシアの3つのチャンネルの放送を禁止しました。

ユニセフと赤十字の支援により、約400人がマリウポリから救出されました。

チェルノフツィの町の南部地域からの難民は、大学の敷地に約1000本のバラを植えました。彼らの多くはボランティア活動を行い、食料や薬を配給し、住民に料理をし、セーフティネットを作り、特別な防護服を縫います。人々が住居、情報、仕事などを見つけるのを助けています。

チェコの都市ではすでに多くの難民が働いており、働くことができない人々は公園や地区で春の大掃除に参加しました。私は難民にお金、食べ物、衣服、風呂用品、おもちゃ、離乳食、食器、シーツ、タオル、その他の必要なものを寄付しました。他のチェコのエスペランティストもできる限り支援しています。困難な時期に人道的であり続けることは非常に重要です。

キエフ地域の市民の殺人と拷問の罪で、多くの実行者がすでに特定されています。殺人者はプスコフから来たので、彼らはロシア人であり、彼らの個人名も分かっています。

ヘルソンで、占領者は、図書館、学校、書店から本を奪い焚書しました（野蛮人は本を必要としません）。そして他の悲しいニュースです：占領者はウクライナ正教会の司祭を捕らえ、拷問し、殺しました。彼は平和な人で、それほど強くなく、それほど若くはありませんでした。彼は罪もないのに殺されました。そしてもう一つのこと：占領者は、法も権利もなしに、占領地からウクライナの子供たちを連れ去りました（彼らは単に盗んだのです）。もうジェノサイドです！